Emil Rittershaus,

# Vestfalio-kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. Vi gloru Rejnon, la fieran,
Jen en la lando de la vin';
Min, kie oni ercon feran
Elfosas, lulis la patrin'.
Surmonte staras abiar',
Travale iras bovo-ar',
Kaj staras kiel gard-starant'
Kverk-arbo ĉe la korto-rand'.
Jen en lulilo kuŝis mi.
Salutas mi vin, Vestfali'!

2. Ni ne parolas kun vi flate,
ne uzas dolĉajn vortojn ni,
ni ne salutas vin tuj frate,
frat-kison donas ne al vi.
Bonvena estas vi nur, se
atentas vi la ŝajnon ne.
Rigardu rekte al la kor'!
Rekteca estas nia mor'.
Interesiĝas ni ne pri
malvaloraĵ' en Vestfali'!

3.Kaj niaj inoj kaj knabinoj,
Ne amas ili por plezur',
La ĉarmaj amo-ŝpinistinoj,
Pro ŝerca amorado nur!
Anĝelo pia gardas, ke
Malfideliĝu ili ne.[3]
En ĝoj' fidela kaj dolor'
Ĝis morto restas kara kor'.
Beata estas vi, se vin
Brakumas Vestfalia in'.

. . .

Emil Rittershaus,

# Westfalenlied

1. Ihr mögt den Rhein, den stolzen preisen,
Der in dem Schoß der Reben liegt;
Wo in den Bergen ruht das Eisen,
Da hat die Mutter mich gewiegt.
Hoch auf dem Fels die Tannen steh'n,
Im grünen Tal die Herden geh'n,
Als Wächter an des Hofes Saum
Reckt sich empor der Eichenbaum.
Da ist's wo meine Wiege stand,
O grüß dich Gott, Westfalenland!

2. Wir haben keine süßen Reden
Und schöner Worte Überfluß,
Und haben nicht so bald für jeden
Den Brudergruß und Bruderkuß.
Wenn du uns willst willkommen sein,
So schau auf's Herz, nicht auf den Schein,
Und sieh' uns grad hinein ins Aug!
Gradaus, das ist Westfalenbrauch !
Es fragen nichts von Spiel und Tand,
Die Männer im Westfalenland.

3. Und uns're Frauen, uns're Mädchen,
Mit Augen blau wie Himmelsgrund,
Sie spinnen nicht die Liebesfädchen
Zum Scherz nur für die müß'ge Stund.
Ein frommer Engel Tag und Nacht,
Hält tief in ihrer Seele Wacht,
Und treu in Wonne, treu in Schmerz,
Bleibt bis zum Tod ein liebes Herz.
Glückselig, wessen Arm umspannt,
Ein Mädchen aus Westfalenland!

. . .

[3] aŭ: De l' rekta voj' foriru ne.
aŭ: Survoje ili falu ne.

4. Vin gardu Dio, tero mia,
Vi lando de l' hero' Armin'!
Ĝis kuŝos mi en tombo ia,
Adoros mia koro vin.[4]
Ho, kara lando Vestfali',
Fortega lando estas vi,
Mortante, vin en lasta hor'
Ankoraŭ benos mia kor'!
Land' inter Rejno kaj Vezer',
Salutas mi vin kun sincer'!

*Traduko de la Germana poemo "Westfalenlied" de* Emil Rittershaus *(∗1834-04-03 – †1897-03-08) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2005-10.*

*Arg-329-664 (2012-11-30 09:40:54)*

*Pri la verkinto Emil Rittershaus troviĝas informoj en la interreto sub `http://www.westfalenlied.de/westfalenlied3/lied.htm`.*

4. Behüt dich Gott, du rote Erde,
Du Land von Wittekind und Teut!
Bis ich zu Staub und Asche werde,
Mein Herz sich seiner Heimat freut.
Du Land Westfalen, Land der Mark,
Wie deine Eichenstämme stark,
Dich segnet noch der blasse Mund
Im Sterben, in der letzten Stund!
Land zwischen Rhein und Weserstrand,
O grüß dich Gott, Westfalenland !

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Emil Rittershaus *(∗1834-04-03 – †1897-03-08), publikigita 1868.*

*Arg-329-663 (2012-11-30 09:42:53)*

*Über den Verfasser Emil Rittershaus finden Sie Näheres im Internetz unter `http://www.westfalenlied.de/westfalenlied3/lied.htm`. La melodio estas aŭdebla en `http://ingeb.org/Lieder/westfale.html`, la muziknotoj troviĝas en `http://www.markomannenwiki.de/index.php?title=Westfalenlied`.*

[4] Pensad' pri vi ĝojigos min.